

Heinrich Heine,

Belŝacar'

tradukita de Manfredo Ratislavo

Ripozis pace jam Babel'
Dum meza nokto, en malhel'.

Nur supre en la reĝkastel'
Vidiĝis flagre torĉa hel'.

Kun sia reĝ-korteganoj
Festenis tie Belŝacar'.

Jen malplenigante pokalojn kun vin'
De l' reĝ' servistaro amuzas sin.

Ĝojigis la reĝon de l' glasoj tintad'
Kaj de la servistoj gajega kriad'.

La reĝo ardis pro la vin',
La vino aŭdacigis lin.

Tentate de la aŭdacoj
Li diras vortojn de blasfem'.

Senhonte la reĝo gloras sin,
La servistaro aplaŭdas lin.

Vokite de l' fiera reĝ'
Servist' ekstaras de la seg',

...

Alportis li multon da ora ilar'
Rabitan for de l' Javea altar'.

Kaj sanktan pokalon per peka man'
Ekkaptis la reĝo, vokante: „Je l' san'!“

Kaj malplenigis li tiun ĉi,
Kun buŝo ŝaŭmanta elvokis li:

„Jave', je eterno mi mokas vin, -
Regant' de Babelo mi nomas min!“

Apenaŭ tion eldiris li,
Ektimon sentis li en si.

Mutiĝis la rido en unu moment',
De l' morto regis la silent'.

Kaj jen! Kaj jen! Sur blanka mur'
de man' aperis la kontur';

Kaj skribis, kaj skribis sur la mur'
Literojn el fajr' kaj foriĝis de sur.

Genu-tremante sur sia seĝ'
kadavre pala jen sidis la reĝ'.

La korteganoj pro terur'
Silente sidis, spiris nur.

...

La magiistoj vokitaj de li
Ne povis klarigi tion ĉi.

Murdata estis Belŝacar'
Samnokte de sia servistar'.

*Traduko de la Germana poemo "Belsazar" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984-03-30.*

MR-109-2 / Arg-205-408 (2004-03-10 11:49:13)